


ESPERANTO

sub la suda kruco

marto 2022





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ**

Volumo 29[1] numero 145 marto 2022

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktisto: Terry Manley

Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers

Kunordigisto: Jonathan Cooper, uzante dezajnon de Joanne Johns

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruc estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZE).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZE: www.esperanto.org.nz / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruc

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15a de majo 2022

La redaktisto rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Pri la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2022 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 2207-0087

SUR LA KOVRILLO: Trevor Steele dum la kongreso (foto de Katja Stele).
Pri ĉiuj fotoj, vidu paĝon 4.

ENHAVO

Antaŭparolo	04
La kongreso de AEA kaj NZEA	05
Poezio kaj Esperanto	08
Du poemoj	09
Rifuĝintoj	10
Jezida komunumo en Armidalo	11
Rifuĝintoj en Nov-Zelando	13
Memoroj pri Volo Gueltling	15
Maljuste elpelita	17
Enigmo	18
Rusa lako kaj papermaĉaĵa artmetio	19
Esperantistoj restu atentaj	21

La kongreso de AEA kaj NZEA estis bona komenco por nia agado por la jaro. Kvankam ĝi ne estis tiel bone partoprenata kiel en 2021, tamen la kvalito de la prezentadoj kaj vigla konversacio montras ke la sperto de la partoprenantoj pri la Zoom medio progresas. Aliflanke la nombro da partoprenantoj emfazas ke esperantistoj malpli entuziasmas pri tia medio. Do ni esperas por 2023.

Oni rimarkas ke ofte la artikoloj en ESK temas pri vojaĝoj aŭ forpasintoj. Mi ŝatas enmeti artikolojn memore al niaj Esperantistaj amikoj forpasintaj. *Esperanto sub la Suda Kruco* restas unu el la malmultaj gazetoj ankoraŭ presata. Tial estas bone havi ian historian perspektivon.

Baldaŭ aperos nova eldonaĵo presigota pere de AEA. Katarina Steele kaj Charles Stevenson kolektis kaj aranĝis materialon por la libro *Galerio de Esperantistoj en Aŭstralio*. Joanne Johns estis la teknika redaktoro. La libro postulis pli ol unu jaro da pretigo kaj nun la unua eldono estas preta por la presisto. Ĝi plenigos bezonon por informo pri niaj membroj pasintaj kaj nuntempaj. Gratulon al tiu grupo.

En la nuna eldono estas poemoj de Elmars senditaj de Trevor Steele kaj ankaŭ artikolo verkita de nova membro Christopher (Kit) Keller pri poezio en Esperanto. Artikoloj diverstemaj ĉiam estas bonvenaj, do verku mi petas!



*Nun kaj tiam,
foto de Joanne
Johns, kiu gajnis
la unuan premion
en la kongresa
fotokonkurso*

Informo pri fotoj

- 1 Trevor Steele dum la kongreso – Katja Steele
- 4 *Nun kaj tiam* – Joanne Johns
- 5, 6, 7 Ekranbildoj de la kongreso – Katja Steele
- 9 Austra Pumpure en 2013 – LabiPasakumi per YouTube
- 11 Polaj infanoj – Archives New Zealand
- 12 Kongresa prelego de Trevor Steele
- 13 Familio en tendara rifuĝejo en norda Irako
- 14 Knaboj en tendara rifuĝejo en norda Irako

- 15 Volo Guelting en la Blua Montaro – Rainer Kurz
- 16 Volo Guelting en Sidnejo – Rainer Kurz
- 18 Poligramo – Donald Rogers
- 19 Skatolo de Fedoskino – Marumi Smith
- 20 Khokhlomaj bovlo kaj cigno – Marumi Smith
- 22 *Hacker* – Clint Patterson per Unsplash (detalo)
- 24 Ilia Dewi kaj Teofilo Jose Maria de Jesus ĉe St Kilda dum la aŭstralia kongreso, Melburno, 2015 – Joanne Johns

La 55a kongreso de AEA, 8a komuna kun NZEA, kaj la 33a somerkursaro

KATJA STEELE (ADELAJDO)



Arto en Orienta Timoro – Teofilo Jose Maria de Jesus

Inter la 8a kaj la 12a de januaro 2022 ni denove kongresis, denove nur pere de la reto kaj denove sen ĉirkaŭbrakoj. La pandemio daŭras. Ĝi forprenis de ni la eblon vojaĝi, la ĝojojn de revido kaj de agrablaj interparoladoj. Sed la “alia flanko de la monero” estas, ke en la retaj renkontiĝoj aperas ankaŭ homoj, kiuj pro diversaj kialoj ĉiukaze ne vojaĝadas kaj ke engaĝiĝas eksterlandanoj, kiuj plej probable ne vojaĝintus al tiom fora loko kiel Aŭstralio. Ili ŝparas ĉi-maniere monon kaj tempon, same ni.

Eĉ se logistikaj taskoj ne necesas, ne eblas eviti la organizajn. Granda danko al la estraro de AEA kaj aparte al Sandor

Horvath kaj Jonathan Cooper pro ilia laboro.

La programo de la kongreso sekvis la kutiman sistemon: en la unua parto de la tago, eventoj kiel malfermo, instruado kaj diskutrondo, posttagmeze diversaj prelegoj kaj aktivaĵoj, vespere prelegoj aŭ distra programo. Kaj AEA kaj NZEA okazigis sian jarkunvenon.

Tiujn, kiuj interesiĝis pri la lingvolernado, gvidis juna usonano Aleksa Miller. La nombro de partoprenantoj variis laŭ la tagoj, sed entute ĉeestis proksimume 22 lernemuloj, el kiuj duono estis regulaj partoprenantoj de la lecionoj. Kvin el la tuto estis nov-zelandanoj kaj tri

KRAJONO LINILO CIRKLERO PAPERO



Sankta geometrio – Terry Manley

venis el aliaj partoj de la mondo.

Sandor Horvath estis la reĝisoro kaj gvidanto de la 5-taga diskutrondo pri rifuĝintoj. Engaĝiĝis en ĝi pluraj esperantistoj kaj ni multe lernis el la kontribuadoj.

Trevor Steele aktive partoprenis en la diskutrondo, sed havis ankaŭ prezentadon de siaj verkoj. Li montris la kovrilpaĝon de la unuopaj libroj (entute 18) kaj el preskaŭ ĉiu legis elektitan ereton.

Inter la unuaj prelegantoj estis Jonathan Cooper. Lia temo nomiĝis *Matematiko: Al senlimo kaj pretere*.

Pasintjare ni perdis elstaran esperantiston Daniel Kane. Lia multjara amiko kaj samideano Charles Stevenson prezentis al ni lian biografion kun multaj, tute ne aŭ apenaŭ konataj faktoj.

La prelegtemo de Terry Manley estis *La sankta geometrio*. Ege simple kaj kompreneble li gvidis la "ĉeestantojn" desegni la geometriajn formojn kaj

montris ilian uzon ekzemple en la arĥitekturo.

Paul Desailly parolis pri la georgiaj gvidŝtonoj kaj pri sia iniciato: Esperanto-centro en Adelajdo, Kam Lee pri la tekstoj de kelkaj kantoj.

Dimitrij Luŝnikov mallonge prelegis pri Esperanto kaj la rusa, Katja Steele la eldonotan libron pri la aŭstraliaj esperantistoj.

Dum niaj kongresoj jam tradicie okazadas ekumena diservo. Ĉi-foje nomita "Alternativa diservo", ĝi estis gvidata de Jonathan Cooper kaj enhavis malstreĉigan meditadon, poemojn, rakontojn, belajn citaĵojn.

La kongreson riĉigis ankaŭ pluraj eksterlandaj prelegantoj. La juna Teofilo de Jesus el Orienta Timoro ŝatas pentri. Ni vidis kelkajn liajn verkojn kaj filmeton pri la galerio detruigita de la registaro. Pri la 20 jaroj de edukado.net parolis ĝia fondinto kaj gvidanto Katalin Kovats. Ŝia retpaĝaro havas admirindan amplekson

kaj estas fonto de plej diversaj informoj.

Duncan Charters, la prezidanto de UEA, respondis la demandojn de la ĉeestantoj kaj Adonis Saliba klerigis nin pri la virtualaj kursoj. Alekso Miller vigle prezentis esperantajn filmojn, pri la sansistemo en Irano parolis Keyhan Sayadpour. Atusi Nisinaga elektis prezenti ĝenerale Esperanton en Azio dum Lee Jungkee gvidis nin al la Seula E-kulturcentro. Ni havis du prelegantojn pri SAT: Vinko Markovo kaj Paz. Stefan MacGill klopodis inspiri nin organizi kaj partopreni seminarion AMO (Aktivula Maturigo). La ĵus pasintan kalendaran jaron resumis David Ryan.

Krom la seriozaj temoj, la kongreso regalis nin ankaŭ per meditado (Chris Krangeloh), magia spektaklo (Fukuda

Toshiro) kaj diskuto pri rugbeo (jOmO). Muzikplena estis la renkontiĝo kun Floreal Martorell kaj Vinilkosmo. Post la sukceso de sia pasintjara kongresa kuirleciono, Helen Palmer denove invitis nin en siajn kuirejon kaj ĝardenon kaj preparis lentosupon.

La plej lasta ero de la kongreso estis la sesio kun prezentaĵoj de fotoj kaj filmetoj. Ni estas kreemaj – ĝi kaj la tuta kongreso pruvis. Kaj ni estas grandparte adaptiĝemaj. Ankaŭ agemaj kaj lernemaj. Scivolemaj kaj malfermitaj al novaj influoj de la vivo.

Estis bone kunesti, eĉ se nur virtuale. La veraj ĉirkaŭbrakoj ja mankis, sed ni tamen ricevis la sentojn de amikeco kaj kunaparteno al la nobla grupo de la esperantistaro.



Magia spektaklo – Fukuda TOSHIRO

Poezio en Esperanto / Esperanto en Poezio

KIT KELLEN (MARKWELL, NSK)

Traleĝante pasintajn numerojn de ĉi tiu revuo, mi vidas, ke regula emfazo estas donita al la finoj de vojaĝoj – omaĝoj al homoj kiuj faris (foje dumvivajn) kontribuojn al la Esperanto-movado. Tia rekono kaj aprezo estas de granda graveco. Tamen, kiel unu el la pilgrimoj de Chaucer en lia *Prologo al la Rakontoj de Canterbury*, mi prezentas min ĉi tie kiel iu komence de vojaĝo. La vojaĝo al kiu mi referencas estas fari poezion kiel maniero lerni Esperanton, kaj lerni Esperanton por fari poezion. Du flankoj de la unu monero – kunigante (en mia emeritiĝo) dumvivan intereson pri lingvo ĝenerale kaj poezio precipe, kaj revivigitan infanan intereson pri la internacia lingvo.

Poetoj, Shelley diris al la mondo, estas “la neagnoskataj leĝdonantoj de la mondo”. Poezio, ekde la tempo de Shelley (almenaŭ), estis, kiel Esperanto, formo de idealismo – maniero kun vortoj imagi, kaj tiel fari, pli bonan mondon. La realo estas la alia flanko de la idealo kaj la rolo de poezio ofte estis montri al homoj tre evidentajn aspektojn de la mondo tia, kia ĝi estas – realaĵoj kiuj ne estis rimarkitaj ĉar, kiel oni diras, “la vivo malhelpis”.

Ĉar spaco estas altvalora varo en ĉi tiuj paĝoj, mi komencos per lastatempa ekzemplo de mia propra laboro en la plej kompakta konata formo de poezio, la hajko.

la suno revenas
la abeloj alvenas
ĉiuj floras nun

Poezio, la loko de la neeblo, havas potencon afinecon, mi kredas, kun la lingvo de neniu kaj de ĉiuj samtempe – la lingvo kiu daŭris esti neeblo dum jarcento kaj duono. En ĉi tiu lumo, mi lasos al vi unu plian, iomete pli longan, poemon.

Mi kredas ke la poezio devas esti kiel loko en menso, al kiu oni venas, kvazaŭ per sonĝo. Ofte mi trovas, ke mi vekiĝas kun poezio, eble en maniero simila al koko trovanta vermon por matenmanĝo en la unua lumo de la tago.

aŭbado

mia kapo fariĝas ŝtona
kaj mi dormas kiel arbaro

mateno vekas min
kun inventitaj birdoj
kiam mi brulos
suno aŭ du
ĉio ĉi por esti sola

nun la koko
kiu similas
liaj revoj
klinikas
por la unua
lumigita vermo

Mi menciuj, disiĝante, ke mi elkovras kelkajn bonegajn planojn por poezio kaj Esperanto en Aŭstralio. Mi ekzemple jam komencis kolekti kaj traduki por antologio de aŭstraliaj poetoj en Esperanto. Kaj mi havas unu propran volumon bone survoje. Mi esperas, ke ni povos daŭrigi ĉi tiun vojaĝon kune!

Du poemoj

ELMĀRS VIRKAVS (LIEPAJA, LATVIO)

Pasas tagoj

Jam delonge mi ne prenis
vian karan, varman manon,
dume sunas, dume pluvos,
luno ŝanĝas la aspekton.

Jam delonge mi ne spiris
vian freŝan korpodoron
kaj ne tuŝis mi per fingroj
la veluran vian haŭton.

Jam delonge ne aŭskultis
vian ĉarman, mildan voĉon;
jam delonge mi ne aŭdis
kiel batas via koro.

Dume sunas, dume pluvos,
luno ŝanĝas la aspekton,
nuboj kun la vento flugas,
tik-takas la horloĝo.

Sed la tempo foren kuras,
forrapidis urĝaj tagoj,
luno ŝanĝis la aspekton,
de la rond' serparka iĝis
minca kiel mia amo.

**(Dediĉita al Austra Pumpure,
kantistino de latvaj popolkantoj
en Esperanto, 1928–2017)**

Nur la sola Dio
kreas el nenio,
sed artistoj faras poezion kaj prikantas vivon
el perditaj propraj iluzioj,
kiuj vundas koron; el ruinoj siaj
de la disfalintaj revoj kaj
el akra amdoloro.



Austra Pumpure

Rifuĝintoj

Laŭ sciencistoj, homoj migris el Afriko antaŭ dekoj da jarmiloj. Ĉu tio rezultis el militoj, el simpla homa scivolo pri aliaj horizontoj, ĉu la movadoj estis volontaj aŭ devigitaj, ni probable neniam scios.

Laŭ la izraela Biblio, niaj prauloj, Adamo kaj Eva, estis elpelitaj el Edeno. Poste la izraelidoj fuĝis al Egiptio por eskapi mortmalsaton en Palestino, kaj poste fuĝis el Egiptio. Vizigotoj, fuĝante for de hunoj, transiris la danuban limon de la Romia Imperio, kaj fine venkis Romon mem kaj metis finon al la okcidenta duono de tiu iam potencega imperio en la kvina jarcento.

La historio donas sennombrajn ekzemplojn de tiuj fuĝoj. Ne ĉiam la “fuĝoj” estis memelektitaj: pensu pri la milionoj da afrikanoj forkaptitaj kaj sklavigitaj en Ameriko kaj aliloke.

Do la temo “rifuĝintoj” estas neniel nova, sed ŝajne eterna parto de la homa historio. Pro la amaskomunikiloj, ni scias pri la hodiaŭa situacio; laŭdire 80 milionoj da homoj estas rifuĝintoj aŭ eĉ ankoraŭ rifuĝantoj.

Dum la januara kongreso de AEA kaj NZEA, Sandor Horvath gvidis specon de seminario/diskutgrupo pri la temo. Li

TREVOR STEELE (ADELAJDO)

parolis pri siaj propraj “fuĝoj”, unue kiel infaneto el Hungario en 1956, kaj poste elektita “fuĝo” el Aŭstrio al Aŭstralio. Sandor tiam montris surekrane pli ol 20 eblajn prelegtitolojn, el kiuj la partoprenantoj povus elekti kaj mem prezenti (kaj aliaj temoj estis bonvenaj, aparte se alilanduloj parolos pri la situacio en sia propra lando).

La nombro da partoprenantoj, kiu variis de tago al tago de la 5-taga seminario, estis malplia ol ĉe la lasta kongreso. Entute, la kongreso mem havis malpli da interesatoj ol pasintjare (Zoom estas tre utila, sed povas postuli tro da sidado ĉe la komputilo). Inter 12 kaj 15 homoj el diversaj landoj aperis ekrane, kaj entute eble 12 homoj – ĉefe aŭstralianoj kaj nov-zelandanoj, sed ankaŭ du-tri el aliaj landoj – prezentis prelegon. (Aliaj partoprenantoj komentis, sed ne mem prelegis.)

Ne gaja temo, kaj fine de kelkaj prelegoj, oni sentis sin nekapabla ion fari pri suferado en evidente maljustaj situacioj. Sed estas bone, ke ni almenaŭ konsciu pri la sorto de sennombraj homoj despere serĉantaj lokon, kie ili povas digne vivi hodiaŭ – kaj bedaŭrinde probable ankaŭ morgaŭ. Ignori la temon signifas kontribui al ĝi.



*Trevor Steele
parolas pri la
politikon de
“Blanka Australio”,
dum la kongresa
diskutro*

Jezida komunumo en Armidalo

TERRY MANLEY (ARMIDALO)

En 2018 Aŭstralio akceptis ĉ 4000 rifuĝintojn el la jezida komunumo el Norda Irako. Oni ekloĝigis ilin en Wagga Wagga, Coffs Harbour, Toowoomba kaj Armidalo. Tiuj flugis rekte el sia lando al Sidnejo kie ili nur vidis la flughavenon. De tie ili flugis al siaj novaj hejmurboj. Pli ol 600 flugis al Armidalo, urbo de proksimume 25 000 civitanoj. Do la jezidoj en Armidalo nun reprezentas ĉ. 2.5% el la civitanaro.

Kial la registraro elektis Armidalon? En la urbo dum dudek jaroj estas du aktivaj grupoj por la setlado de rifuĝintoj en Aŭstralio. Armidala Azilo (Armidale Sanctuary, aŭ "AS") ekzistas ekde 2003, kaj ARAR, armidala branĉo de regionaj aŭstralianoj por rifuĝintoj dum simila periodo. Post ŝanĝoj al la registara

programo por vizitoj, estas malfacile por organizoj rekte subteni rifuĝintojn. Do en 2017, post jaroj da rekomendado per tiuj organizoj, Armidalo estis elektita kiel setlejo por rifuĝintoj. AS kaj ARAR ankoraŭ aktivas por la rifuĝintoj, kiujn la registaro tenas sur insuloj Manus kaj Nauru, sed post la alveno de la jezidoj, estiĝis organizoj kun fokuso por helpi la novajn alvenintojn.

La jezidoj (angle: Ezidi, Yezidi aŭ Yazidi) estas malplimulta komunumo en norda Irako apud Kurdistano en la regiono Sinjar. Estas proksimume duonmiliono da ili. Ties religio antaŭdatas la islaman religion (kaj eĉ la judan) de la regiono. La religio kredas je unu dio kun 1001 nomoj. En jezidismo, fajro, akvo, aero kaj la tero



estas sanktaj elementoj nepoluendaj.

Ili estis persikutataj dum jarmilo pro siaj religio kaj kulturo. Post islamigo de iuj kurdaj triboj en la 10a jarcento, tiuj kun aliaj islamanoj kune persekutis la najbarajn jezidojn. En la jaro 1832, ĉ. 70 000 jezidoj estis mortigitaj laŭ ordono de islamaj kurdaj reĝidoj. Dum la armenia genocido 1915–17, multaj jezidoj estis mortigitaj. Laŭ Aziz Tamoyan, ĝis 300 000 mortis kaj aliaj fuĝis al Transkaŭkazio. La brita armeo atakis vilaĝojn de Jezidoj en 1925, kaj mortigis pli ol 100, inkluzive ties estron. Jezidoj suferis pro masakro en 2007 en Mosul. Bombado mortigis 796. Laŭ rakontoj kaj kantoj de la jezidoj, ili suferis pro tiaj abomenaĵoj 74 fojojn en sia historio. Pro tio, ili translokiĝis de tempo al tempo.

Post la invado en Irakon de okcidentaj nacioj, la norda regiono iĝis pli malstabila. Ĝi fine estis sub la reĝo de la kurdoj. La tiel nomata Da'esh, aŭ ISIS aŭ ISIL, forpuŝis tiujn el Mosul kaj pli kaj pli regis la regionon. En 2014 Da'esh invadis Sinjar kaj Kocho, kie ili mortigis centojn da jezidoj. Ili ankaŭ sklavigis la inojn kaj infanojn. Miloj fuĝis al la montaro de Sinjar. Ankoraŭ restas ĉ. 200 000 en tendaraj rifuĝejoj en norda Irako. En 2021 estis fajro en la tendaro, kiu detruis multajn tendojn.

Nuntempe fako de UN, UNITAD, esploras la respondecon de Da'esh rilate al la mortigo de la jezidoj.

En Armidalo estas grupo, Norda Setlada Servo, kiuj helpas la komunumon adaptiĝi al ties nova vivo en Aŭstralio. Lernado de la angla kaj pri la servoj disponeblaj – sana, dunga, monsubtena – estas la plej gravaj aferoj por ili. Rotary helpas pri projekto agrikultura. Multaj el la rifuĝintoj laboris pri agrikulturo en sia lando.

La servo ankaŭ kunligas familiojn al membroj de la armidala komunumo por helpi lingve, socie kaj stude. Mi kaj mia edzino helpas geedzojn kun du etaj infanoj. Plej ofte estas pri konversacio, sed ankaŭ pri studtemoj por la edzo, ĉar li deziras iam studi je universitata nivelo. Ja granda tasko en nova lingvo kaj post la interrompo en edukado. Dum la kvar jaroj antaŭ ilia alveno (2014–18) ili loĝis en tiu tendaro sen ebleco fari multon. Feliĉe, la gepatroj kaj gefratoj de la edzino ankaŭ sukcesis setli en Armidalo, sed ne la familio de la edzo. Liaj gepatroj kaj liaj sep gefratoj kun familioj ankoraŭ restas en la tendaro apud Sinjar. Jam dum ok jaroj.

► Por spekti la prelegon de Terry dum la virtuala kongreso en januaro 2022, iru al youtu.be/yHoBNYTATIo.



Rifuĝintoj en Nov-Zelando

DAVID RYAN (WELLINGTON)

Dum nia kongreso/somerkursaro en januaro 2022, Sandor gvidis sesiojn pri rifuĝintoj. Mi partoprenis prelegante pri rifuĝintoj en Nov-Zelando. Jen resumo de mia prelego.

Nov-Zelando estas ĝenerale bonveniga lando por rifuĝintoj kiuj plejparte alvenas kadre de internacia programo de la Unuiĝintaj Nacioj. Nuntempe alvenas ĉiujare proksimume 1500 rifuĝintoj. Je alveno, ili pasigas ses semajnojn en akceptejo en Auckland, kie ili lernas pri nia kulturo kaj kutimoj en Nov-Zelando kaj, se necesas, oni instruas la anglan al ili. Poste, oni sendas ilin al diversaj grandaj urboj tra la lando. Por kelkaj rifuĝintoj, tio povas esti sufiĉe glata sperto ĉar jam ekzistas grupoj de aliaj rifuĝintoj de la sama lando, aŭ almenaŭ homoj de la sama lingvo aŭ religio. Tamen, imagu se oni sendas ilin al ne tiel granda urbo, kie ne estas homoj de la sama lando, lingvo, aŭ religio por helpi ilin. Bonŝance, membroj de preĝejoj kaj moskeoj kaj asocioj, kiel ekzemple la Ruĝa Kruco, helpas rifuĝintojn.

Rifuĝintoj sendas siajn infanojn al la sama lernejo kiel ĉiuj aliaj nov-zelandanoj. Ili ricevas kursojn por lerni kiel stiri aŭtomobilon kaj oni trovas por ili domon. Tamen, loĝado estas pli kaj pli malfacila afero en Nov-Zelando, ne nur por rifuĝintoj sed ankaŭ por aliaj homoj kiuj ne havas monon por lui/aĉeti domon. Nuntempe la registaro elspezas grandan sumon por loĝigi ilin "intertempe" en hoteloj kaj moteloj dum ili atendas domon. Tio ne estas bona afero.

Trovi laboron por rifuĝintoj povas esti malfacile se ili ne parolas la anglan aŭ ne havas sperton. Kelkfoje ili estas

spertuloj pri fako sed oni ne rekonas iliajn universitatajn studojn ĉi tie en Nov-Zelando. Antaŭ 30 jaroj mi konis tre afablan kaj lertan rifuĝinton el Makedonio. En sia lando li estis infankuracisto kaj, fakte, estro de hospitalo. Li parolis pli ol 10 lingvojn. En Nov-Zelando li devis refari ekzamenojn por pruvi ke li havas medicinajn sciojn. Intertempe, li devis labori kiel tradukisto kaj en restoracio. Finfine, oni akceptis lin kiel kuraciston kaj li trovis laboron en loka hospitalo. Li havis bonan ŝancon, sed multaj nov-alvenintoj devas labori kiel taksiistoj. Tamen, rifuĝintoj povas havi sukceson. Ekzemple, du rifuĝintoj el Irano kaj Eritreo nun estas parlamentanoj!

Niaj unuaj "oficialaj" rifuĝintoj estis judoj el Eŭropo, kiuj venis antaŭ la Dua Mondmilito. Kelkaj estis esperantistoj, kio helpis nian lokan movadon. Poste venis polaj infanoj dum la Dua Mondmilito, venis hungaroj kaj ĉeĥoj pro kontraŭ-komunistaj revolucietoj en tiuj landoj, ĉilianoj post la milita puĉo tie en la 70aj jaroj, homoj el Vjetnamio, kaj rifuĝintoj el la eksa Jugoslavio en la 90aj jaroj. Plej antaŭnelonge venas rifuĝintoj ĝenerale el arabaj kaj afrikaj landoj, ekzemple Irako, Sirio, Afganistano, Somalio ktp. Ankaŭ estas multaj rifuĝintoj el Kolombio pro la tiea enlanda milito.

Ĝenerale pri migrado al Nov-Zelando: plejmultaj nov-zelandanoj estas britdevenaj kaj maorioj. En la 19a jarcento venis homoj, plejparte viroj, el Ĉinio por labori en orminejoj. Ili havis malfacilan vivon. Oni diskriminaciis kontraŭ tiuj ĉinoj kaj oni timis pri tiuj "flavaj" fremduloj. Poste venis grupo de kroatoj, kaj multaj

el ili helpis starigi nian nun mondfaman vinkultivan industrion. Ekzemple, Nobilo kaj Babich estas bone konataj vinfarejoj de kroata deveno.

En la fina duono de la 20a jarcento venis miloj da nederlandanoj. Oni akceptis ilin ĉar ili bone al kutimiĝis al nia kulturo kaj lingvo kaj ili estis "blankuloj". Jes, Nov-Zelando tiutempe preferis blankajn enmigrantojn! Mi laboris antaŭ 30 jaroj kun homo kiu antaŭe estis laborinta en registara enmigra instanco. Li diris al mi ke li devis tralegi petojn de nederlandanoj en Indonezio (kiu estis nederlanda kolonio ĝis 1949) kaj kontroli ke temas pri "blankaj" indoneziaj nederlandanoj. Mi naskiĝis kaj loĝis kiel infano en Christchurch kaj mi

memoras ke iun tagon mi devis serĉi en telefonlibro numeron por bela junulino, kiun mi renkontis, kun nederlanda lasta nomo. Mi memoras ke estis paĝoj plenaj je tiaj nomoj, ekzemple van de Berg, van Dijk ktp. En Christchurch antaŭ 40 jaroj nederlandanoj estis verŝajne la plej granda ne-brita grupo.

Ekde antaŭ proksimume 30-40 jaroj, Nov-Zelando akceptas pli da enmigrantoj, ĝenerale el Azio. En romkatolikaj preĝeoj estas multaj filipinanoj, sed plejparte temas pri ĉinoj. Tamen, venas migrantoj el ĉiuj mondpartoj. Nuntempe mi ofte vidas butikojn, kiuj vendas sudafrikajn varojn.

Do, la estonta vizaĝo de Nov-Zelando estos pli multkultura.



Polaj infanoj venis al Nov-Zelando en 1944

Memoroj pri Volo Gueltling 1927–2021

Volo Gueltling mortis la 13an de decembro 2021 dum sia 96a jaro. Li naskiĝis en Germanujo kaj dum la dua mondmilito li estis en malliberejo ĉar li estis pacemulo.

En Esperanto-Domo mi ĉiam volis aŭskulti la perfektan kaj fluan Esperanton, kiun li parolis. Dum jaroj, li havis germanan aŭton.

Roger Springer

Mi estas tre malgoja, ke Volo ne plu vivas. Li estis tre speciala Esperantisto. Liaj Esperanto-gepatroj en Germanio decidis bapti lin kun la Esperanto-nomo Volo. Kvankam "Volo" bone sonas germanlingve, ĝi tute ne estas germana nomo. Feliĉe la gepatroj povis konvinki la germanajn instancojn ke li povas ricevi tiun nomon. Tiel li certe estis la sola germano kun tiu antaŭnomo.

Volo multe helpis min kiam mi unue alvenis al Sidnejo. Li akceptis min ĉe la flughaveno, kaj ŝoforis min per sia tre malnova Volkswagen Käfer ("skarabo") al la diversaj vidindaĵoj ĉirkaŭ Sidnejo. Li ankaŭ helpis min traduki diversajn tekstojn el la germana al Esperanto. Dankon Volo!

Jen interesa historio de Volo: Kiam Volo estis ĉirkaŭ kvardekjaraĝa li devis liveri leteron al la aŭstralia konsulejo en Munkeno/Germanio. Tie li vidis, ke homoj vikatendis kaj li demandis kial. Aŭstralia oficisto respondis, ke la homoj vikatendas por ricevi vizon por migri al Aŭstralio. Volo neniam havis intereson forlasi Germanion sed la oficisto rekomendis ke Volo ja povas ankaŭ vikatendi. La vico ja ne daŭras tiel longe kiel ĝi aperas, kaj eĉ se Volo sukcesus ricevi la vizon li ja ne devus uzi ĝin.



Volo sukcesis ricevi la vizon, sed li ja ne vere volis forlasi Germanion. Tamen la vizo eĉ pagis la vojaĝon al Aŭstralio, kondiĉe ke li restos minimume du jarojn. Volo decidis uzi tiun oferton kaj reveni post du jaroj. Li unue ricevis laboron de la ŝtato por labori en fora kampara loko en la konstruado de nova trajnlinio. Volo, kiu kutimis labori en oficejoj, tute malŝatis tiun manlaboron. Feliĉe, post kelkaj monatoj, li trovis ne-korp-laboron en granda urbo (mi supozas en Sidnejo). Iel li forgesis reiri al Germanio post la du jaroj. Ŝajnas, ke li laboris por diversaj dungistoj (inter ili, banko) ĝis sia emeritiĝo.

Rainer Kurz

Mi ja memoras tiun "skarabon" de Volo. En la 1990aj jaroj li veturis al la klubo en Redfern per ĝi ĉiun semajnon. Tom Elliot rezervis aŭtospacon apudkluban por la "skaraba aŭto" por ke Volo povu tuj eniri la klubon. Ĉiam mirigis min la vidkapablo de Volo. Li montris al mi poŝvortaron kiun li ĉiam portis. Ĝi estis germana-Esperanta vortaro kaj la preslitteroj en ĝi estis tiom etaj ke mi ne povis legi ilin. Volo, sufiĉe pli aĝa ol mi, facile legis sen okulvitroj. Volo estis estrarano en kaj la Sidneja Esperanto-Asocio kaj la Esperanto-Federacio de NSK en la 1980aj

kaj 1990aj jaroj, fidine alveninta al la klubo por ĉiuj kunvenoj.

Terry Manley

Volo Gueltling estis ne nur bona, sed eĉ bonega amiko de mi. Ek de la momento kiam mi metis miajn danajn piedojn sur aŭstralian teron, li ĝojigis min. Kaj li parolis ne nur Esperanton, li parolis ankaŭ la anglan kaj la belegan germanan lingvon. Li estis ja naskita en belega Germanujo, kaj li alparolis min en la dana lingvo, kiun li lernis en Danujo. Li vere mirigis min. Kaj, krom scipovi tiom da lingvoj, li scipovis ankaŭ multajn aliajn aferojn. Tre amikema kaj admirinda homo li estis.

Bob Felby

Mi unue renkontis Volon en Hamburgo, Germanujo, en la unua jaro post la milito. Li estis junulo, kaj, kun aliaj hamburgaj esperantistoj, vizitis la centran fervojstacidomon por saluti la multajn

nederlandajn kaj aliajn esperantistojn kiuj vojaĝis vagonare el Nederlando al la kongreso de SAT en la urbo Aarhus en norda Jutlando, Danujo. Ĉar tiu vagonaro haltis kelkajn horojn en la ĉefstacidomo de Hamburgo, la tieaj esperantistoj ricevis la permeson suriri sur la peronon por tra la fenestretoj saluti la esperantistojn, kaj ili ne rajtis eniri la vagonojn. Mi tamen eliris por fari fotojn de la hamburgaj esperantistoj, inkluzive de Volo Gueltling.

Kvin jarojn poste, mi migris al Aŭstralio kaj en AEA-kongreso surpriziĝis renkonti Volon, kiu jam antaŭe ankaŭ estis migrinta el Eŭropo. Post tio ni regule renkontiĝis en AEA-kongresoj. Dum sia tuta vivo li estis daŭra laboranto por Esperanto. Ni ambaŭ estis membroj de SAT kaj dum certaj periodoj ni estis SAT-perantoj. Ni krome estis politikaj amikoj.

Honoron al la ofte tre utila laboro de Volo por Esperanto kaj por AEA.

Marcel Leereveld



Multaj filmoj sin prezentas kiel "bazita sur fakta okazaĵo".
Tio pravas ankaŭ pri tiu ĉi rakonto.

Mia nomo estas Dawson. Miaj *pater* kaj *mater* nomas min Cuthbert por distingi inter mi kaj mia frato Alistair kaj mia fratino Annabelle, sed en la mondo, el kiu mi estis ĵus elpelita (pri tio poste), oni uzas nur familiajn nomojn.

Tiu mondo, al kiu mi aludas, havas la nomon Darlington Grammar School. Ĝi estis fondita dum la regado de Henriko VIII kaj estas sendube la plej prestiĝa gimnazio en la tuta Imperio. Onidire eĉ Ŝia Reĝina kaj Imperiestrina Moŝtino Viktoria pripensas sendi tien siajn idojn. Ĉiu, kiu pasigas kvin jarojn ĉe Darlington, povas atendi bonan karieron, ĉu en la kolonia servo, ĉu en la justicistemo, ĉu en komerco, ĉu en politiko, ĉu en universitata vivo, eĉ en la eklezio (kompreneble la anglikana eklezio).

Estas baze nur du kondiĉoj, se oni volas iri al Darlington. Oni devas aparteni al la anglikana eklezio – ne gravas, ĉu vi estas ateisto aŭ sekreta diablo-adoranto, kondiĉe ke vi de tempo al tempo montru vin en preĝejo. La alia kondiĉo estas, ke via *pater* havu sufiĉe da mono por pagi la altajn kotizojn. Ho, mi forgesis diri, ke estas hereda afero: via *pater* devis esti darlingtonstano, aŭ alikaze donaci dikan monsumon al la lernejo.

Ĉe Darlington la instruado inkluzivas la latinan kaj la grekan (la antikvan, ne la degenerintan modernan ĵargonon, kiu nomas sin greka), historion de la Romia Imperio kaj la Brita Imperio, geografion de la diversaj landoj de la Brita Imperio, kaj iomete da ĥemio kaj fiziko. Krome oni okazigas historiajn dramojn, grandparte el la romia periodo (multe da mortigo per glavoj) kaj la brita historio (multe da senkapigoj). Lun tagon Chatsworth, samklasano, demandis

la instruiston, "Sinjoro, kial ni lernas tiom pri la romianoj?" La instruisto respondis: "Iam ili havis sian imperion, nun ni havas nian. Ni povas lerni de ili."

Estas alia elemento de la vivo en Darlington, kiun mi devas mencii, kaj ĝi rilatas al mia elpelo, mia maljusta elpelo. Estas diversaj nomoj por la afero, sed "sklaveco" estas la plej ofta. Ĉiu knabo en la kvina (lasta) jaro okupas propran ĉambron kaj rajtas havi sian propran sklavon el la unua klaso. La sklavo devas fari tre diversajn taskojn, depende de la ideoj kaj humoroj de la kvinaklasa mastro, sed estas kelkaj bazaj laboroj. La sklavo devas ĉiam poluri la ŝuojn aŭ botojn de la mastro, devas zorgi, ke la planko de la ĉambro de la mastro estu balaita, kaj se la mastro leĝere ĵetas librojn aŭ kajerojn sur la plankon, la sklavo devas levi ilin kaj bonorde surbretigi. Mi scias, ke almenaŭ du knaboj en mia jaro, Bugsworth kaj Johnson, devigas siajn sklavojn masturbi ilin, sed ni ĉiuj prisilentigas la aferon.

Nu, en mia unua jaro mi estas sklavo, kompreneble. Winterbotham, mia mastro, estis relative nepostula sed pigra ulo. Li ja diris, "Purigu miajn botojn kaj ĉambron, aŭ mi forigos viajn orelojn," sed tio estis nur tipa formo de humuro. Nur unu fojon, kiam mi pretervidis kotobulon sub lia lito (li intence metis ĝin tien), li batis min per vergo. Ĝenerale mi akceptis la situacion, ĉar mi sciis, ke iun tagon mi estos mem mastro. Kaj tiu sperto bone preparos min por iam ordoni al afrikanoj kaj azianoj en la kolonioj.

Pasis jaroj, kaj jen, mi estis fortaspekta dekkvinjarulo en la kvina klaso. Bedaŭrinde mi ne sufiĉe atentis, kiam oni

asignis sklavojn. Senpense mi akceptis okulvitroportan maldikuleton kun la nomo Broadstrand (eĉ hodiaŭ mi ne konas lian voknomon). Sed baldaŭ mi konstatis, ke la nervoza knabo daŭre forgesas farenaĵojn. Estis enuige devi ripeti, "Hej, Broadstrand, miaj ŝuoj estas malpuraj! Broadstrand, ĉu vi estas blinda – rigardu mian plankon! Ĉu vi bezonas plifortajn okulvitrojn?"

Do mi decidis, ke mi donos lecionon al Broadstrand, kaj mi avertis miajn najbarojn, Stewart kaj Naseby, pri la plano. Iomete da timo sendube helpos akriĝi la memorpovon de Broadstrand. Do mi lerte prunteprenis el la ĉambro, kie oni gardas la teatrajn kostumojn, hakilon (ne el ŝtalo, nur el papermaĉaĵo, sed konvinke timiga).

Kiam Broadstrand aperis, mi aktoris grandan koleron, kaj diris, ke estas tempo, ke la senutila knabo lernu ion. Mi venigis Stewart kaj Naseby kaj montris al Broadstrand la hakilon. Mi diris, ke mi

nun forhakos lian kapon, kaj mi forigis liajn okulvitrojn. Mi signalis al miaj najbaroj, ke ili kovru la okulojn de Broadstrand per blindiga tuko kaj tenu lin tiel, ke lia nuko estu sur la horizontala parto de seĝa dorsapogilo, do en bona loko por la "senkapigo". La stulta knabo komencis lukti kiel ĵus hokita fiŝo, kaj mi simple piketis lian nukon per normala tranĉilo...

Kiel mi povis scii, ke Broadstrand suferas je korproblemo? Kiam li subite ceŝis lukti kaj kolapsis, ni unue kredis, ke li aktoras. Sed fakte li estis mortinta. Stewart kaj Naseby fuĝis el mia ĉambro kaj venigis instruiston. Do mi devis aspekti kiel la sola kulpulo.

Kaj nur pro tio oni elpelis min! Ne estis vera haki! Mi intencis nur doni necesan lecionon! Kial neniuj avertis min pri la korproblemo de Broadstrand? Kaj kial ĝuste mi ricevis tian senutilan sklavon?

Mi malamas maljustecon, kaj aparte forte, kiam mi estas la viktimo!

Enigmo

DONALD ROGERS (WELLINGTON)

Ĉi tiu enigmo estas poligramo, kiu estas speco de krucvortenigmo sen difinoj. Kompletigu la kradon uzante la donitajn literojn por fari Esperantajn vortojn. Uzu ĉiun literon nur unufoje. Ni donas specialan konsileton, ke unu el la vortoj estas traduko de la angla esprimo "on the way out".

Oni povas solvi la enigmon per plumo kaj papero, aŭ oni povas iri al

puzzlefoundry.com por solvi la poligramon tie. La nomo estas "5x5 sen difinoj 6". Ligilo: bit.ly/poligramo-5x5

Ĉi tiu enigmo estas elpensita de Donald Rogers kaj publikigita kun la permeso de puzzlefoundry.com, kiu estas retejo por tiuj, kiuj ŝatas solvi aŭ krei krucvortojn en Esperanto aŭ en la angla aŭ la afrikansa aŭ la germana.



Rusa lako kaj papermaĉaĵa artmetio

MARUMI SMITH (TORQUAY)

Fono de ĉi tiu artikolo

Lastatempe Alba della Fazia Amoia (aĝo 90+), kiu loĝas proksime al Romo, Italujo, decidis sendi al mi arojn da delikate pentritaj kaj lakitaj rusaj khokhlomaj bovloj kaj manpentritaj malgrandaj lakskatoloj – ĉiuj kulturoriĉaj kaj plaĉaj. Fakte, nia amikeco disvolviĝis inter ni per la lingvo Esperanto, ĉar ESK bonvole kaj bonkore publikigis ŝian originalan artikolon *Du Sistemoj – Igor Mosin*, tradukite el la angla al Esperanto de Heather Heldzingen kaj mi (ESK Decembro 2020 kaj Marto 2021). Laŭ telefonkonversacio kun Alba, la artaĵoj estis ŝiaj propraj memoraĵoj el Ukrainio en 1957, kiam ŝi vizitis Sovetunion pro komerco kiel vojaĝverkisto kaj akademiano.

La stato de konservado de la pentraĵoj estas mirinde bona kaj freŝa. Ili ĉiuj aspektas novaj, malgraŭ la 64 jaroj kiuj pasis ekde ŝia aĉeto.

Originala papero de la fabrikado troviĝis en la skatoloj, kiuj altiris mian atenton, do mi serĉis per Google la historion de ĉi tiu artmetio.

Historio de arto Khokhloma

Vikivortaro informas ke la artmetio Khokhloma ŝuldas sian originon al la

Malnovaj Kredantoj (the Old Believers), kiuj fuĝis for de persekutoj de oficialuloj. Tiuj Malnovaj Kredantoj de la Rusa Ortodoksa Eklezio, estis nomitaj Friponoj, ĉar ili rifuzis adaptiĝi al la reformoj de Patriarko Nikon de Moskvo inter 1652 kaj 1666.



Dum la anatemo de la sekvaj du jaroj, la Malnovaj Kredantoj rifuĝis en lokaj arbaroj en la distrikto Koverninsky, regiono Volga. Evoluante kune kun la ekzistantaj kapabloj de lokaj ikonfarbistoj, ili perfektigis la teknikon de pentrado sur ligno en ora koloro sen la uzo de vera oro. La aĵoj estas surtablaj varoj gravuritaj el ligno. La unua tavolo sur la ligno konsistas el argila

mortero, linoleo kaj stana aŭ alumina pulvoro. Floraj desegnoj estas pentritaj sur la surfaco per peniko sekvata de tavolo de linoleo. Laste la tuto estas malmoligita en forno.

Hindujo kaj Persujo estis la ĉefaj merkatoj, sed post ekspozicio en Parizo en la 19a jarcento, Eŭropo aliĝis al tia konsumogrupa. La merkato en la frua 20a jarcento forvelkis, sed en la 1960aj jaroj Sovetunio formis la asocion "Khokhloma Painting" en urbo Semyonov, kiu konservis kaj revigligis la industrion.

Rusa arto de lakitaj kestoj

Fedoskino, Palekh Kholui kaj Mstyora, estas la kvar ĉefaj urboj kie la instruado pri kiel metiadi lakskatolojn aktive funkciis ekde 1795.

Kvankam la skatoloj palpe ŝajnas solidaj, ili fakte estas faritaj el papermaĉaĵo.

Rusa laka arto estis tradicie uzata en ikona pentrado dum imperia Rusio, provizante multajn preĝejojn kaj hejmojn. Tio daŭris ĝis la rusa revolucio de 1917. Nuntempe ĝi estas revigligita fare de junaj artistoj. Iliaj produktaĵoj estas disponeblaj interrete tutmonde.

La skatoloj prezentas komplike mane desegnitajn miniaturajn pentraĵojn pri diversaj temoj, inkluzive de fabeloj, poemoj, pejzaĝoj, trojkaj, batalaj scenoj kaj malnovaj artmajstraĵoj. Multaj tavoloj de lako estis aplikitaj al kaj internaj kaj eksteraj sekcioj, provizante mirindan brilon al la skatoloj. Ili havas kapablon elteni ŝanĝojn en atmosferaj kondiĉoj kaj eviti fendetiĝon kaj verŝajne estos ĝuitaj de multaj generacioj (Ref: la papero de la fabrikanto en la skatolo).

► Laboreja video de Fedoskino:
youtu.be/HSW6lCcDxss



Monda historio de laka arto

En antikva Egiptujo, ĉerkoj kaj mortmaskoj estis faritaj el kartonaĵo, kiu konsistas el tavoloj de papiruso aŭ tolaĵo firmigitaj per gipsa miksaĵo. Ĉirkaŭ 200 KE, ne longe post kiam paperfarado estis lanĉita, la ĉinoj utiligis la teknikojn por formi soldatajn kaskojn, spegulujojn, flartabakajn skatolojn, aŭ ceremoniajn maskojn. La persoj uzis papermaĉaĵon por produkti malgrandajn pentritajn skatolojn, pletojn, etaĝerojn ks. En Japanujo kaj Hindujo, papermaĉaĵo estis uzata por ornamo kirasojn kaj ŝildojn. Ĉinujo kaj Japanujo evoluigis unikan uruŝi-lakon (el uruŝi-arba suko – *Toxicodendron vernicifluum*). Per maldika, duontravidebla

tavolo, ĝi kreas misteran briladon sur la budhismaj statuoj kaj tablovaroj. Uruŝio estas grava gluo vaste uzita por ripari historiajn templojn kaj sanktejojn. (Vidu youtu.be/xMjVBks9k8Y).

Konkludo

Persekuto kontraŭ religiaj aŭ politikaj grupoj en mondaj konfliktoj rezultigis ke tiaj grupoj fuĝis por aliloke loĝi. Tio ankoraŭ daŭras en la 21a jarcento. La artistoj Khokhloma memorigis min, ke tiuj heredis ecojn de la Malnovaj Kredantoj. Ecojn por rezisti – dediĉon, pasion, paciencon kaj amon por vivo. Tiuj kondukas al “eta miraklo”, brilspegulitaj en la plej elegantaj aspektoj de ties kreadoj.

Esperantistoj restu atentaj

GAZETARA KOMUNIKO DE UEA

Universala Esperanto-Asocio (UEA) konstatis amasiĝon de retaj trompo-provoj uzantaj Esperanton. La trompo-provoj plej ofte okazas per retpoŝto kaj trompisto per sufiĉe konvinka Esperanto celas akiri informojn kaj monon de nesuspektemaj homoj. La trompo-provoj ne venas de esperantistoj: rimarkeblas la uzado de tradukiloj kiel Guglo-Tradukilo, sed pro la altiĝo de la kvalito de tiuj servoj, la redaktostilo povas simili al tiu de fluparolanto. Tiuj trompo-provoj ne estas novaj: trompisto provas de jaroj fiagi per diversaj lingvoj, lastatempe ankaŭ per Esperanto, kaj la reta kaj telefona trompo-provado signife kreskis en la pandemia epoko, kiam diversaj proceduroj povas nun okazi plene rete.

Policoj tra la mondo jam identigis kaj listigas tiajn trompo-provojn. Foje serĉo per retaj serĉiloj de menciitaj nomoj en la trompmesaĝo tuj malkaŝas la trompon.

La plej oftaj mesaĝoj estas tiuj de homo, kutime vidvino, suferanta pro malsano, kiu bezonas lasi al heredonto grandan sumon por uzado por sociaj bonfaraj celoj. Sed estas aliaj aliroj, kiel tiuj de usonaj soldatoj aŭ soldatinoj, kiuj, estante for en iu alia lando, volas amikiĝi. Foje ankaŭ estas mesaĝo de fraŭlinoj al viroj, serĉantaj amrilatojn. La Asocio forte rekomendas, ke esperantistoj restu atentaj kaj ne reagu al tiaj mesaĝoj. Pro diversaj kialoj bedaŭrinde estas riskoj, ke trompo-provoj sukcesu enkapti homojn.

Se vi ricevis tiajn mesaĝojn per retpoŝto, gravas marki ilin kiel spamon kaj/aŭ datumkaptan provon al via retpoŝta servo kaj bloki la koncernan falsan kontaktanton. Se vi vidis tion en sociaj retoj, eblas denunci ne nur kiel datumkaptan provon, sed ankaŭ kiel falsajn profilojn. Fariĝas kutime en sociaj retoj kiel Facebook, ke homoj aldonadas

esperantistojn al siaj amikrondoj kaj tial ili ekaspektas kiel esperantistoj: sed ricevante amikiĝpeton de nekonato, atentu ĉu vere la homo estas esperantisto aŭ ĉu temas pri falsa profilo.

Ne ĉiam la celo de la trompisto estas rekte akiri monon. Ili ankaŭ celas akiri datumojn, inkluzive fotojn. Gravas, ke esperantistoj ĉiel ajn ne sendu datumojn al nekonatoj, retpoŝte aŭ per nekonataj retejoj. Esperantistoj observu ĉu iliaj kontoj en sociaj retoj havas striktajn privatecajn agordojn. Post kapto de datumoj la trompisto povas uzi ilin por kibernetika atako, por vendi ilin al

la "Malluma Teksaĵo" ("Dark Web" en la angla) aŭ eĉ por malfermi kontojn ĉe bankoj, aliaj financaj institucioj aŭ administraj instancoj en la nomo de la trompitoj. Ni reliefigas, ke esperantistoj restu atentaj, suspektu mesaĝojn kaj ankaŭ kontaktojn de nekonato; ne ĝiru monon; ne donu datumojn (inkluzive pertelefone, ĉefe se ne vi alvokis); kaj ne alklaku ligilojn aŭ malfermu alkrōĉitajn dosierojn, se vi ne estas atendanta ilin. Ĉiuj restu sekuraj.

Trovu aliajn gazetarajn komunikojn de UEA ĉe uea.org/aktuale/komunikoj



Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
(07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

Committee Members:
Terry Manley, Paul Desailly

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Bradley McDonald | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

Committee Members:
Erin McGifford, Josuo Moss, Stephen Epstein
NZEa's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEa is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@
gmail.com
0800 350 781

What is this?

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

